# *Nicolás Maduro alvokas popolan mobilizon por defendi la nacian suverenecon.*



Karakaso, 22 mar (RHK) La prezidento Nicolás Maduro alvokis la venezuelan popolon al granda mobilizo diman?e la 26-an de marto, por rifuzi la intervenisman planon de la usona ?tata departemento.

“Je 23 jaroj de la eliro de la komandanto Hugo Chávez el la malliberejo de Yare, mi kunvokas al mobilizado por defendi la patrolandon kaj la nacian suverenecon. Mi alvokas al unui?o de la popolo fronte al tiu ?i kondutmaniero de la venezuela dekstrulado, kiu petas intervenon en la lando. Venezuelo estas suverena kaj demokratia lando, kiu havas la plej demokratian konstitucion en la monda historio”, emfazis la prezidento dum kunsido de la  ministra konsilantaro, okazinta en la Palaco de Miraflores, la? raportis la televida ?eno Telesur.

Maduro emfazis ke la venezuela popolo ne malrespektas la suverenecon de aliaj landoj, ?uste por ke oni ne sinenmiksu en la internajn aferojn de la Patrio de Bolívar.

La prezidento denuncis ke ?iuj partioj kaj politikaj gvidantoj de la venezuela dekstrularo estas subvenciataj de grupoj de ri?uloj en Miami, Usono, kun la celo impulsi intervenon de la usona imperiismo.

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/124847-nicolas-maduro-alvokas-popolan-mobilizon-por-defendi-la-nacian-suverenecon

**Radio Habana Cuba**